

Oomoto

1
9
7
2

nov.-dec.

Onisaburo kaj lia Skolo

Vadime ELISSEEFF
Ĉefkuratoro
Muzeo Cernuschi

Post jarcentoj da sendependeco kaj prudenta izola politiko, Japanujo sin jetis, fine de la XIX-a jarcento, en la ludojn de milita kaj ekonomia ekspansio. Dum la XX-a jc. la ekonomia ekspansio sukcesis tie, kie la milita ekspansio estis malsukcesinta. Sur ĝiaj spuroj la kultura radiado, antaŭe politikumita kaj timita, poste bonvena, kreskas tagon post tago. Ĝi penetras en la postmilita periodo ĉien kaj en ĉiujn mediojn; jen temas pri epopeaj romanoj, hajkoj, dramoj noaj kaj kabukaj, jen pri pentritaj kakemonoj, brilaj biomboj, gravuraĵoj, kiujn ŝatas okcidentanoj, jen pri antikvaj hani-voj¹⁾ kaj la klasikaj artaĵoj kiel inroj²⁾ kaj necukoj³⁾; jen pri florarangĝo, teceremonio, praktikado de zeno kaj judo.

En malproksima Oriento, kiel aliloke, la kontrasto inter hodiaŭa betono kaj hieraŭa ligno povus esti rompon inter la nuntempo kaj la pasinteco. Sed la japanaj arkitektoj jam montris, ke plej aŭdacaj teknikaj verkoj povas en si traduki malnovajn ritmojn. Tiu inspiro-kontinueco ebligas konservi seninterrompan ligan inter la antikva religia mondo kaj la laika mondo de nia materiismo. Ĉiam do restas eĉ en la plej eta japana kreaĵo ero da kredo. La interpenetrado, eĉ margena, de sankta arto kaj de profana arto estas unu el la konstantaj karakterizoj de japana kulturo. Dum la tuta daŭro de ĝia historio la kredbezono sentiĝis pli-malpli forte. Same kiel en Eŭropo dum la XVII-a jc. kun la mistikuloj, aŭ dum la XIX-a jc. kun la establo de la Sankta Koro, Sanktulino Teresa de Lisieux, kaj en 1917 la miraklaj vidiĝoj de Tatima, tiel ankaŭ en Japanujo la mizero ĉe la komenco

Oomoto

47-a jaro

n-ro nov.-dec.
(389-390), 1972

monata organo de Oomoto kaj Universalala Homama Asocio (eldono: dumonata)

Fondita en 1925

Redaktoro: T. Nakamura

Administracio (por alsendo de abonkotizo, manuskriptoj, informoj, k.s.):

OOMOTO, Kameoka,
Kioto-hu, 621 Japanujo.

Telefono: Kameoka (2) 5561.

Posta ĝirkonto: Kioto 25637 (Oomoto).

Presisto: Tensei-ŝa, Kameoka

Jara abono: 1200 enoj aŭ 12,—ned. guldenoj

Reprezentantoj de Oomoto, ĉe kiuj estas pagebla la abonkotizo, troviĝas en 22 landoj.

Pagebla ankaŭ rekte al la administracio de Oomoto, aŭ al Universalala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176. Rotterdam -2. Nederlando.

Cirkulas en ĉ. 80 landoj.

AVIZO

Japandevenaj vortoj, kiujn ni de temp' al tempo uzas sen glosoj en ĉi tiu revuo, estas troveblaj en EJ (= *Enciklopedieto Japana*).

de industria epoko Meiji kaj la konsterno kiu sekvis la malvenkon en 1945 generis multajn spiritajn movadojn, kiuj konkretiĝis per fondo de multenombraj religiaj grupoj.

En tiaj cirkonstancoj, kaj trafita de malfeliĉo, malklera kamparanino Nao Deguĉi fondis en 1892 la religion Oomoto. Unu sendito por kunlabori kaj subteni ŝin, granda talentulo kaj inteligentulo redaktis ŝiajn dirojn kaj siajn proprajn pensojn, tiel pleningante milojn da paĝoj, kiuj konsistigas la proksimume 80 volumojn da sanktaj tekstoj de tiu nova religio. Fariĝinte adopta filo de Nao, li prenis la familinomon Deguĉi, kaj poste la 'antaŭnomo' Onisaburo, kiu laŭ la japana kutimo fariĝis lia aŭtoronomo.

La dogmoj de la novaj religioj estis alireblaj por ĉiu. Ili ne celis konvinki la intelektulojn, nek la riĉajn kaj klerajn popolklasojn, sed celis helpi ĉiujn en kiu ajn socia pozicio, precipe laboristojn kaj kamparanojn, kiuj frontis mizeron, senlaborecon aŭ ĉiutagan malsekurecon.

Onisaburo la giganto, kiel nomas lin liaj admirantoj, estas verŝajne la plej alloga figuro. Lia vivo estas plena de spiritaj, artaj kaj politikaj grandfaroj. Lia fido je homamo vaste transpasis la japanan teritorion; li fondis Universalan Homaman Asocion kaj adoptis Esperanton kiel ĝian oficialan lingvon por tutmonda agado.

Lia artista personeco evidente



**Ĉe la inaŭguro de la ekspozicio salutas s-ro Elisseeff,
direktoro de l' muzeo**

estas por ni la plej fascina. Arto ludas gravan rolon en la religia vivo de la novaj religi-grupoj. Ĝi, tie, estas ĝenerale konceptita kiel kontemplado: tiel, unu el la plej belaj muzeoj en Japanujo estas tiu de la religio Tenri, kaj unu el la plej belaj ĝardenoj, eta surtera edeno, estas tiu de la religio Sekai-Kjūsei, dum la kolektantoj kaj mecenatoj de la religio Perfekta Libereco (PL-kjō) ofte organizas artajn manifestaciojn. Al la ĝojoj de meditado la religio Oomoto aldonas tiujn de kreado. Ĉe Oomoto, arto estas ekzerco kiu kondukas al Dio. Por ĉiu potisto, ĉiu teksisto, por ĉiu metiisto, por ĉiu artamanto, arta kreado valoras kiel preĝo. En tiu spirito vivas nuntempe la ĉefkomunumoj de Oomoto, Kameoka kaj Ajabe en la nordokcidenta regiono for de la tre arta urbo Kioto.

Tiu intima interplektiĝo de arto kaj vivo ebligas al la hodiaŭa homo resti fidela al la plurjarcentaj tradicioj de la grandaj naciaj religioj, kiujn la grandanima kredo de Oomoto ne kontraŭstaras sed respektas.

Kio aparte ĉarmis nin en la arto de Onisaburo, estas la mirinda vivo-ĝojo, kiu radias ĉe liaj verkoj. Tiu ĝojo jam estas familiara al ni per la japanaj pentraĵoj de monaĥoj de Zeno, kiel ekz-e Sengai, kies verkojn ni ekspoziciis antaŭ dek jaroj, en 1962, kaj ni retrovas ties plenan vervon ĉe Onisaburo kaj liaj disĉiploj. Sed la nuna ekspozicio elvokas novan bildon de

tio, kio povas rezulti el ardkreda temperamento baraktanta tiom en klasika tradicio kiom en tradicio de la ĉanojo (teceremonio).

En la evoluo de japana ceramiko, la “trikoloraj” vazoj markis promesplenan epokon en la VIII-a jc. de nia erao. De tiam la formoj kaj la koloroj rivalis por ĉiam plibeligi templojn kaj hejmojn. Speciala branĉo de tiu artkreado sekvis la serenajn sed severajn preskribojn de la ĉanojo, tre postulema rilate la bovlojn. La zorgo doni al la objektoj plej fidelan aspekton de la naturo estigis faradon de neregulaj formoj, torditaj potventroj aŭ nesimetriaĵoj. La koloroj, kia ajn estis ilia riĉeco, malaperis, konservante nur la unuton normon aŭ la modeston de nuancaj tonoj.

Onisaburo novigis tion, transdonante al la koloroj tiun “sovaĝan” aspekton, kiu ĝis tiam estis rezervita al la formo. Liaj verkoj fariĝis entute, kaj ne plu nur duone, speguliĝo de la naturo: la brilo de kolormakuloj ekvilibras la potencon de la linioj.

Tiuj verkoj estas tiel viglecaj, ke ili nun nomiĝas en Japanujo “Joŭan” (brilbovloj). Ili, kred-entenantaj, alportu iom da sana gajeco sur la horizonton de nia arto nuntempa, ofte tro seniluziiga kaj foje tro sofisma. La ekspozicio prezentas ankaŭ la verkojn de la familio Deguĉi, disĉiploj kaj idoj de Onisaburo. Aro da pentraĵoj, potoj kaj teksaĵoj montras la amplekson de la talento de tiu familio kaj ĝia diverseco.



La japana karavano tostar la inaŭguron



Ĉe la inaŭguro salutas s-ro Kiotaro Deguĉi, kiel delegito de s-ino N. Deguĉi

1) *hanivo*, antikva argila figuro de homo, besto ktp. ; 2) *inro*, lakarta miniatura kesteto plurfaka (t.e. konsistanta el pluraj fakoj — ĉiu kun sia fundo — surmetitaj unu sur alia) por porti sigelilojn, aŭ poste medicinaĵojn; 3) *necuko*, ĉizita butono ligita per silka ŝnuro kun la inro, kiun oni portis ĉe sia zono.

Ĉiuj aliaj terminoj estas troveblaj en P. I. V., aŭ se ne, en la Enciklopedieto Japana.

— Notoj de la Red.

Parolado de s-ro Pierre Dangles

S-ro Pierre Dangles estas Vicprezidanto de la Urba Konsilantaro de Parizo kaj membro de la Estraro; ĉi tiu lia parolado estis farita la 20-an de Okt., '72 ĉe la Akcepto en la salono de la Urboprezidantejo, okaze de la ekspozicio "Onisaburo kaj lia skolo" prezentita en Muzeo Cernuschi. — La Red.

S-ro Ministro,
S-ro Ambasadoro,
Sinjorino,
Sinjoro,
Gesinjoroj:

Paul Claudel iam diris ke Parizo

ricevis ian spiritan mision en la mondo. Se oni akceptas ĉi tiun opinion, kaj la pariza konsilantaro certe ne kontestos ĝin, oni logike devas pensi ke estas nia tasko akcepti la verkojn de Onisaburo kaj

lia akolo kaj ilin prezenti al la pariza publiko.

Necesis ja ke la beleco kaj originaleco de tiuj verkoj ne restu pli longe fremdaj al ni, kaj ke la familianoj de Onisaburo Deguči venu ĉe ni kiel atestantoj de liaj tiom allogaj spiritaj kaj artaj konceptoj.

Ni dankas gesinjorojn Kuratorojn de Muzeo Cernuschi, kiuj malkovris la kvaliton kaj intereson de tiu arto, kaj s-ron Prefekton kaj s-ron Direktoron de Kultura Agado, kiuj finance ebligis organizadon de la ekspozicio.

Mi cetere rimarkas feliĉan koincidon: la urbeto Kameoka, kie fondiĝis kaj vivadas la arta kaj religia fondaĵo Oomoto, estas proksima al la antikva ĉefurbo Kioto, kun kiu Parizo kontraktis Amikecan

Pakton kaj konstante organizas kulturajn interŝanĝojn.

Tiel, karaj japanaj amikoj kaj artistoj, vi posedas kroman meriton por kapti niajn simpation kaj prizorgemon. Tio diras ankaŭ, kiom vi estas bonvenaj en ĉi tiu urbo-domo.

Per viaj multaj talentoj poetaj, aŭtoraj, pentristaj, kaligrafiistaj, potistaj, kaj muzikistaj vi mirinde ilustras la unuecon de Arto, kiun Baudelaire tiel poete elvokis:

“Comme de longs échos qui de loin se confondent

Dans une ténébreuse et profonde unité

Vaste comme la nuit et comme la clarté

Les parfums, les couleurs et les sons se répondent.”



S-ro Pierre Dangles kaj s-ro Kiotaro Deguči interparolas

Rimarkinde estas ke la perfekteco de via arto ne lasis vin izoligi de homamaso, nek resti en fermita rondo de inspiritoj kaj talentuloj. Vi male persvadas la homaron, ke via arta universo estas alirebla por ĉiu ne nur per emocio donita de finita artaĵo, sed ankaŭ per arta kreado.

Tiel vi donas ekzemplon de modesteco kaj simpleco, kaj vi komunikas nerezisteblan deziron partopreni vian vivoĝojon.

En la idealo, kiun vi predikas kaj de kiu viaj verkoj estas vivanta reflektado, estas kvazaŭ alvoko al nia hodiaŭa mondo, trovi feliĉon perditan pro ĝiaj materiaj zorgoj. Via aserto, ke spiritaĵoj superas la materialan kaj fizikan mondon, same kiel tiu omaĝo al praktiko, kiun konsistigas via ilaro — taso, bovlo, poto — atestas pri via deziro har-

monie akordigi la diversajn tendencojn de homo kaj, fine, disflorigi ties homecon. Ekvilibro kaj paco, kiuj ŝajnas rezulti el viaj esploroj, devus pripensigi niajn samepokojn kaj espereble ilin ĉarmi.

La eksterordinara trablovo beleca, pureca kaj harmonieca, kiu iel estas propraĵo de malproksimorientaj tradicioj, ne povas karesi nin parizanojn sen ĉarmi kaj sen senti nin penetri ties riĉaĵojn ĝisfonde.

Mi deziras al ekspozicio "Onisaburo kaj lia skolo" la plej grandan sukceson inter nia pariza publiko, en kiu troviĝas, kiel sciante, eksterlanda elito el la tuta mondo. Mi aldonu sen fanfarono ke urbo Parizo rajtas iel fieri pro sia kontribuo al disradiado de arto, kiu devas havisian lokon en la historio de nuntempa Arto.


Saluto de Kiotaro Deguĉi

ĉe Japana Vespero en Parizo

Mia avo Onisaburo estis multflanka artisto. Sed li estis ankaŭ granda spritulo. Li ofte ridigis homojn per ŝercoj kaj vortoludo. Mi nun estas iom sub lia inspiro kaj volas diri: En "Parizo" troviĝas rizo, kaj en "Japano" troviĝas pano. Vere estas, ke hodiaŭ oni facile povas manĝi rizon en Parizo, kaj ni japanoj, eĉ en nia hejmlando, ofte manĝas ankaŭ panon. Nun tamen, al Parizo ni ne venis por manĝi rizon; ni venis al Parizo ja por la arta ekspozicio de Onisaburo kaj lia skolo, kaj ankaŭ por tiu ĉi "Japana Vespero"!

Sed speciale por ni oomotanoj, Parizo havas tre gravan signifon: ĝi okupas elstaran lokon en la historio de Oomoto kaj Universala Homama Asocio.

Antaŭ preskaŭ 50 jaroj — en la jaro 1924, Onisaburo alprenis Esperant-



brilbovtoj

kaligrafiaĵo

on kiel la oficialan lingvon de Oomoto kaj Universala Homama Asocio por internacia agado. Kaj jam la sekvantan jaron li sendis s-ron Koogecu Niŝimura al Ĝenevo por partopreni la 17-an Universalan Kongreson de Esperanto. Post la kongreso, s-ro Niŝimura fondis en Parizo nian Eŭropan Centron. Li eldonadis tie la monatan gazeton "Oomoto Internacia" dum multaj jaroj. Intertempe fariĝis granda la nombro de niaj esperantistaj amikoj en Eŭropo. Sed bedaŭrinde, pro la tiama mondsituacio politika, nia Eŭropa Centro en Parizo devis esti fermita en la jaro 1933.

De tiam pasis plenaj 40 jaroj. Feliĉe, la torĉo de nia Esperanta laboro, iam portata de "Oomoto Internacia" estas plu tenata de "Oomoto".

Kaj nun, denove post longa tempo, Parizo fariĝis nia Eŭropa Centro, kvankam portempa, kiel la unua urbo en la mondo ekster Japanujo, por okazigo de la arta ekspozicio de Onisaburo kaj lia skolo. Tiamaniere vi vidas, ke Parizo kaj ni oomotanoj estas intime ligitaj per Providenco. Mi estas certa, ke Onisaburo nun spirite ĉeestas en tiu ĉi salono, kaj tre kontenta, li bonvenigas, salutas kaj benas vin ĉiujn !

Mi ankaŭ tre ĝojas, ke la ekspozicio donis al ni la okazon renkontiĝi ĉi tie kun tiom multe da geesperantistoj en Parizo, aŭ venintaj el aliaj urboj de Francujo kaj ankaŭ el eksterlando. Ni do plej sincere kaj elkore

dankas kaj salutas vin, la tutan ĉeestantaron!

Nu, permesu, ke mi parolu nur per kelkaj vortoj pri Universala Homama Asocio kaj Esperanto. Onisabro, la fondinto de Universala Homama Asocio, iam diris: Tiu, kies amo ne transiras la limojn de lia aŭ ŝia familio, estas barbaro, aŭ subevoluinto el la kulturnivela vidpunkto. Eĉ kanajlo havas tian amon almenaŭ por siaj familianoj. Ankaŭ ŝovinisto estas barbaro, ĉar lia amo ne transiras la limojn de lia patrujo. Nia amo nepre devas esti universala. Kaj ju pli pura kaj ampleksa estas ies amo, des pli ĝi estas proksima al Dia amo.

Kiam Onisaburo renkontis Esperanton por la unua fojo, li ĝin eklernis kaj tuj vidis en ĝi praktikan interfratigilon de la homoj, kaj samtempe trovis, ke la Homaranismo de D-ro Zamenhof, aŭ la "interna ideo" de la Esperantismo estas tute parenca, se ne identa, kun lia Homam-ismo aŭ la celado de Universala Homama Asocio. Kaj Esperanto fariĝis nia oficiala lingvo. Tio okazis, kiel mi jam menciis, antaŭ preskaŭ duonjarcento. Mi diris "preskaŭ", ĉar ĝuste la venontan jaron ni festos la Oran Jubileon de Esperanto en Oomoto kaj Universala Homama Asocio. Kaj tiurilate, mi jam povas fari al vi anoncon pri ĝojinda afero. (daŭrigo al p. 158)



En Muzea ĉambro improvizita por teceremonio s-ino M. Deguĉi prezentas tepreparon

IOM PRI LA BIBLIO

Jam multaj studoj, kritikoj kaj diskutoj aperis pri tiu Libro, kiu efektive estas laŭ sia originala nomo la Libro de la Libroj, ĉar ĝi entenas efektive 60 librojn skribitajn en plej diversaj epokoj. Vere mi ne estas inda skribi eĉ mallonge pri tiu libro, la Sankta Skribo, plej grava por la veraj kristanoj en la tuta mondo. Sed io tamen devigas min.

Walter Scott, fama angla verkisto, kies librojn oni tradukis en multajn lingvojn, antaŭ sia morto petis al sia filo: "Donu al mi la Libron!" Li petis la Sanktan Biblion. Al Dostoewski, kiam li kuŝis mortanta, lia edzino devis laŭtlege el tiu Libro. Dickens donis al ĉiu sia infano, kiam ili forlasis la familian hejmon, la Novan Testamenton kun enskribo: "Tiu ĉi estas la plej bona libro, kiun iam konis la mondo kaj konos."

Jes, tiu ĉi libreto estas tradukita en pli ol mil lingvoj kaj ĉiujare kelkcentoj da homoj studas, laboras kaj tradukas por aperigi ĝin almenaŭ en partoj en pli multaj lingvoj, kaj dialektoj eĉ de malgrandaj indiĝenaj

triboj. Ĝi aperas en milionoj da ekzempleroj ĉiujare kaj la nombro superas tiun de la plej disvastigitaj romanoj kaj literaturaj verkoj.

La hungara Radio en Budapest dufoje elsendis serion da intervjuoj kun scienculoj, profesoroj, arthistoriistoj, diversekleziaj teologoj pri "La Mondo de la Biblio", pritraktante tiun ĉi verkon el diversaj vidpunktoj: historie, arte, literature, jure, socie, kulture, lingvistike. La konkludo, kiu aperis en journaloj, estis, ke ĝi estas laŭ ĉies vidpunktoj tia trezoro por la homara kulturo, ke ĝi ne povas manki en la biblioteko ĉu de kredanto, ĉu de nekredanto, kaj ĝia daŭra efiko al la kultura kaj historia vivo estas nepriskribebla kaj valorega.

Laŭ la nuntempe plej fama hungara dramverkisto László Németh, ĝi "per la eventoj de la liro, dramo kaj epiko nutris dum jarcentoj la legantojn"... kaj tion ĝi certe faros, dum homoj vivas en nia mondo.

Ni ne forgesu, ke Michelangelo, plej granda geniulo de ĉiuj tempoj, pentrante la senkomparajn fresko-

pentraĵojn de la Kapelo de Siktus, ne legis dum la tuta tempo ion alian, ol la *Biblion* kaj la *Dian Komedion* de Dante.

Apud la *Biblio* atestis la fama scienculo Pascal kaj la plej granda muzikisto Bach. La pedagogo Pestalozzi deklaris en 1815, ke tiu libro donis al li kaj al la siaj kuraĝon, forton, paciencon kaj forton dum atakoj, mokoĵ, kiam ili estis malriĉaj kaj malsanaj. Ĝi estis fidela akompananto de la esploristo de Azio, Sven Hedin, kiu vojaĝis tra Orienta Turkestano. Kiam la karavano estis en mortdanĝero sur la dezerto kaj devis ĉion forlasi, kio estis nenecesa, la sola libro, kiun Hedin kunportis, estis la *Biblio*.

Alia modesta scienculo Benjamin Franklin en societo de scienculoj kaj verkistoj en Parizo, kiam oni parolis pri la *Biblio*, deklarante, ke ĝi estas jam malnoviĝinta, forĵetebla, elprenis el sia poŝo libron kaj petis permeson ion laŭtleĝi el tiu antikva libro, kies beleco lin multe ravis. Post la konsento li legis parton el la profeto Habakuko. Ĉiuj admiris tion ekkriante: “Kia mirinda! Vere iu genia animo devas esti skribinta tion!” — “Nu, diris Franklin, tio estis nur eta parto el la kritikita *Biblio*”. — Cetere la fama svedo Kirkegaard rimarkis: “La *Biblio* ne servas, ke ni kritiku ĝin, sed ke ĝi kritiku nin!”

Fama hungara orientalista, kiu unue redaktis la tibetajn gramatikon kaj vortaron kaj kiun la budhistoj tiom estimis, ke oni pretigis statuon de li, sidanta kiel bodisatvo, do budhista sanktulo, kiu nun estas videbla en sanktejo de la Budhista Universitato en Tokio. Sándor Körösi Csoma, la granda scienculo, kiam en Hindujo lin vizitis angla kuracisto, petis el proponitaj libroj unuavice la *Biblion*, kiun li dum ok tagoj tra legis.

Mi povus daŭrigi la liston, sed nun mi povas sciigi ion pli interesan: mi konas emeritan evangelian pastoron en Slovakujo, kiu pro inspiro studis la tutan *Biblion*, trovante, ke ties literoj konformiĝas al melodiaj sonoj, kiuj — malgraŭ tio, ke la librojn de la Sankta Skribo skribis diversaj homoj en diversaj epokoj — mirinde kaj harmonie agordiĝas kvazaŭ daŭrigo de la sama melodio, pruvante la veron de la deklaro de apostolo Paŭlo: “Ĉiu skribaĵo inspirita de Dio estas ankaŭ utila por instruo, por admono, por korekto, por disciplino en justeco. . .” (II. Timoteo, 3 : 16.) La pastoro mem skribis al mi, ke li “malkovris en la *Biblio* mirindajn nombrokonsonancojn kaj kaŝitajn simbolajn tendencojn kun rivela kapablo, kaj povas evidentigi ĉion per ilustraĵoj”. Lia 500-paĝa tajpita verko en lingvo hungara havas la titolon “Mitozo, nombrosistemo kaj

figuranta agado en la Sankta Skribo” kun 600 ilustraĵoj. Jam du docentoj ĝin tralegis kaj deklaris: “Senprecedenca, genia laboro.” (Kompreneble en la nunaj cirkonstancoj la eldono de tia libro ne estas facila.)

Jesuo mem klare atentigis: “Vi esploras la Skribojn... en ili vi havas eternan vivon, kaj ili estas tio, kio atestas pri mi...” (Sankta Johano 5:39.) Ni scias, ke li aludas la Malnovan Testamenton, ĉar tiu estis lia Biblio; la Nova Testamento ja ankoraŭ ne estis skribita.

Kaj ĝuste tiu Biblio-parto estas plej multe kritikita; ĉar ĝi enhavas kaj montras terurajn krimojn, plej malbonajn kvalitojn kaj farojn, — sed ankaŭ ties sekvojn kaj la punojn ofte severajn. La tuta Biblio estas malkaŝa spegulo de la homa vivo, de la homa animo por instrui, veki penton kaj rigardi sin mem, tiel gvidante homojn al sindona, humila, servanta kaj laboranta vivo por la homfratoj kaj por la plej altaj diaj idealoj. Sekaj ne-profundpensantaj legantoj ne povas tion eble ekvidi en ĝi, sed oni devas ripete, humile kaj preĝante, tre atente studi ties partojn. Ĉiuj religianoj kun diversaj filozofiaj, spiritistaj, metafizikaj tendencoj — do ankaŭ oomotanoj — povas kun edifo trovi, ke en la tuta Biblio, en ĉiuj partoj aperas mirindaj kaj laŭ niaj nunaj scienco kaj scio ankoraŭ

ne klarigeblaj okazintaĵoj, nomeblaj mirakloj, aperaĵoj, diaj senditoj: anĝeloj, spiritoj, superaj voĉoj, demonoj, faloj kaj releviĝoj, mortoj kaj reviviĝoj, malsaniĝoj kaj saniĝoj, mizeriĝoj kaj ekstazoj, kaj ĉio celas montri, pruvi, instrui, gvidi supren kaj doni savon, fidon, certigon pri la eterna, por ni nekompreneble glora vivo. Kaj jam miloj trovis en ĝi konsolon, vivcelon, saniĝon kaj gracon.

Hungara katolika pastro János Hock kaj kalvinana pastoro István Benkó en siaj skribaĵoj vicigis eĉ unu apud la alia la anĝelojn, spiritojn, profetojn, klarvidantojn, antaŭdirantojn kaj mediumojn. Nur laŭ iliaj fruktoj oni povas prijuĝi, ĉu ili estas veraj aŭ falsaj.

La popolo de la Malnova Testamento ne konsistas el superaj estaĵoj, sed estas elektita por montri al la homaro: kiaj estas virtaj aŭ malvirtaj homoj; kio okazas al la pekantoj, kiuj ne sekvas la leĝojn de Dio kaj kion Dio volas, tion malgraŭ ĉio Li efektivigas. Tion pruvas la antaŭdiroj de la profetoj kaj de Jesuo, kiuj eĉ post jarcentoj mirinde realiĝas — inter tiuj estas videbla en la nuna epoko la rekolektiĝo de la judoj en restarigita ŝtato. Sed tio ne rajtigas ilin fieriĝi kaj blinde sekvi naciajn celojn, ĉar la vera celo estas akcepti Jesuon kaj atendi Lian promesitan

alvenon. Tio signifas por ĉiuj popoloj, ĉu judoj, ĉu aliaj, ke nek deveno, nek bapto aŭ alia ceremonio aŭ filozofio helpas savi la homojn, se ili ne akceptas kaj sekvas humile, sindone la vojon de Jesuo.*) Oni volis dum la miljaroj ofte neniigi la Biblion, denunci ties instruojn, persekuti kaj kondamni ĝiajn legantojn kaj sekvantojn, nomi ĝin pseŭdo-scienco. . . vane! En ĝi estas tia vivforto, tia vero, kiajn pravas ĝuste nuntempe la malkovro de diversaj antikvaj memoraĵoj, ŝtonoj, skribaĵoj. Oni sinsekve pravas el ili, ke la okazintaĵoj rakontitaj en la Sanktaj Skriboj estas retrovitaj en tiutempaj priskriboj sur ŝtonoj, statutoj, pergamenoj. Oni eĉ jam tian trovis, kiu pravas, ke la Evangelion de Sankta Marko oni skribis jam 50 jarojn post la naskiĝo de Kristo, do vere tiamaj kunvivantoj skribis kaj ne skribis, kiel oni dum longa tempo asertis, nur en postaj jarcentoj. Oni povus skribi apartajn artikolojn kaj studojn pri tiaj malkovroj.

Ĝi estas vere dialektika libro. Oni povas serĉi kaj trovi en ĝi multajn kontraŭdirojn kaj strangaĵojn, kiujn multaj scienculoj kaj teologoj poste parte klarigis. Kvankam la fama filozofo Voltaire diris, ke post cent

jaroj neniu plu legos ĝin, milionoj akiras ĝin kaj legas ĝin en ĉiuj mondpartoj, eĉ, kiel lastatempe oni konigis: miloj da gejunuloj, hipioj en Usono kaj en aliaj landoj avidas akiri ĝin.

Ni devas do akcepti: ĝi estas la grava kaj atentiga sciigo por ni, veninta de iu Supera Estaĵo, kiun en diversaj lokoj oni nomas sub diversaj nomoj, sed en Esperanto: DIO. Certe tio instigis doktoron Zamenhof, ke li dum jaroj pene sed sukcese traduku la Malnovan Testamenton kaj per tio atestu pri ĝia graveco por la tuta homaro. Nun oni komencis klopodi fari eĉ pli fidelan tradukon de la tuta Biblio en Esperanto.

OOMOTO

oomotisma

universala-homamisma

kulturponto inter

oriento kaj okcidento,

sudo kaj nordo

Jarabono: 1200 enoj

Laŭlanda tarifo troviĝas

sur p. 160

*) Paralele kun tiu ĉi sincera aserto de la kristana aŭtoro, ni volonte akceptus bonvolajn kontribuaĵojn el Israelo, por konigi la biblian interpreton de nekristanaj hebreaĵoj esperantistoj. — Noto de la Red.

La naturaj faktoroj de kuracado (3)

AERTERAPIO

(kuracado per la aero)

La haŭto estas sentiva surfaco, kiu pro sia riĉa nerva filamentaro rilatigas nin konstante al la ekstera medio. Tio ebligas favore influi la diversajn internajn organojn kaj eĉ la psikon pere de la aero sub formo de aerbano laŭ jena tekniko:

Ĉiutage frumatene, antaŭ matenmanĝo, kaj/aŭ ĉiunokte, 3 horojn post la lasta manĝo, senvestiĝu kaj restu tutnuda en kontakto kun la aero (ne en la suno) dum 1 aŭ 2 minutoj la unuan tagon; 2 aŭ 4 minutoj la duan tagon; aldonu 1 aŭ 2 minutojn ĉiun sekvantan tagon ĝis atingi 20-30 minutojn kaj tiam daŭrigu tiun tempodaŭron ĉiumatene kaj/aŭ ĉiunokte, seninterrompe.

Somere estas preferinde preni aerbanon ekstere subĉiele. Kiam malvarmas, se oni ne kuraĝas fari tion subĉiele (iompostioma alkutimiĝo, kiel supre indikite, evitas ĉiun riskon), oni povas resti en la ĉambro antaŭ malfermita fenestro (aŭ pordo), tutnuda kompreneble, dum la sama tempodaŭro. Se vi sentas malvarmon, frotu la korpon per tuko aŭ per la manoj aŭ faru

gimnastikajn ekzercojn. Se vi estas tre malforta, alia persono povas froti vin. Prefere prenu la aerbanon nudpiede sur seka grundo. Se temas pri kahela aŭ ŝtona planko, kovru ĝin per tabulo aŭ tapiŝo aŭ surmetu pantoflojn. Por eviti maldiskretajn rigardojn, improvizu provizoran ŝirmejon pere de tolaĵo aŭ io simila. Se ne eblas al vi resti tutnuda, surmetu bankalsonon. Dum la aerbano la piedoj devas esti varmaj; se ili estas malvarmaj, unue revarmigu ilin kaj, se necese, surmetu lanajn ŝtrumpojn. Ne necesas stari dum la aerbano; vi povas sidi aŭ kuŝi. Fininte, enlitigu kaj revarmigu.

La aerterapio estas tre efikoplena ĉe sendormeco, alta sangopremo, kor-, arteri-, metabol-, endokrin- kaj nervaj malsanoj, k. t. p. Ĝi preskaŭ ne havas kontraŭindikojn kaj estas sukcese aplikebla al la granda plimulto de la malsanoj.

La terapicela spira gimnastiko apartenas fakte al la aerterapio kaj ankaŭ al la kinezoterapio.

HELIOTERAPIO

(kuracado per la sunradioj)

La suno regas la vivon de nia planedo: plantoj, bestoj kaj homoj dependas de la sunradioj, kiuj estas nepre necesaj por ilia vivo.

Bedaŭrinde la civilizita homo, de antaŭ multaj jarcentoj, sin kovras per vestaĵoj, kiuj malhelpas la rektan kontakton kun tiu fonto de energio. Kiel logika sekvo, do, lia haŭto paliĝas kaj velkas kaj lia tuta korpo suferas, antaŭdispoziciante lin al malsano.

La sunradioj estas grava faktoro de la sano; kaj ankaŭ grava faktoro de kuracado en la granda plimulto de la malsanoj.

Ne ĉiuj malsanuloj povas ricevi sunbanon, kompreneble. Ĉe febro, pulma tuberkulozo, alta sangopremo, gravaj hepat-, ren-, kor-, arteri-kaj nervaj malsanoj, k. t. p. estas konsilinde ne preni sunbanon.

Escepte de tiuj kazoj, ĉiu malsanulo povas preni sunbanon laŭ jenaj indikoj:

Ĉiumatene elmetu vian tute nudan korpon al la sunradioj; frumatene, dum somero aŭ en tropikaj landoj; antaŭtagmeze, dum vintro. Komencu per 1 minuto la unuan tagon kaj aldonu 1 minuton ĉiun sekvantan tagon ĝis atingi 20-30 minutojn (eĉ pli, se vi bone toleras tion), kaj tiam daŭrigu tiun tempo-daŭron ĉiutage seninterrompe. Zorgu, ke la sunradioj trafu egale vian korpon kaj sur la dorsa kaj sur la ventra flankoj (turnu vin, tiucele). Se ne eblas preni tiun sunbanon matene, prenu ĝin posttagmeze, 3 horojn post la tagmanĝo dum

vintro kaj iom pli malfrue dum somero por eviti la varmegon. Se la sunradioj dolorigas al vi la kapon, protektu ĉi-tiun en la ombro dum la sunbano.

Por eviti maldiskretajn fremdajn rigardojn dum via sunbano, improvizu en la korto aŭ teraso provizoran ŝirmejon pere de pendantaj kovriloj, tolaĵoj aŭ io simila. Vi povas laŭplaĉe stari aŭ kuŝi sur matraco, tapiŝo, faldebla lito aŭ rekte sur la planko. Se tute ne eblas al vi resti tutnuda, surmetu bankalsonon. Se la sunradioj penetras en vian ĉambron, vi povas preni sunbanon en la interno, sed malfermante la fenestron (aŭ pordon), ĉar la sunradioj traŝirintaj vitron ne plu estas kuracivaj.

Estas konsilinde, ke la infanoj ekde sia plej frua aĝo prenu ankaŭ sunbanon laŭ jena tekniko:

Trimonata infano prenos ĝin dum 1 minuto ĉiutage (po duonminuto sur la dorsa kaj ventra flankoj). Kvarmonata infano ĝin prenos dum 2 minutoj ĉiutage (unu minuto sur ĉiu flanko); kvinmonata, dum 3 minutoj; kaj oni aldonas 1 minuton ĉiunmonate, ĝis atingi 5 minutojn ĉiutage ($2\frac{1}{2}$ minutojn ĉiuflanke), kiam la bebo estas 7-monata. Se infano pli ol 7-monata startas kun sunbanoj, ĝi komencos per 1 minuto dum la unuaj du semajnoj, kaj aldonos 1 minuton ĉiudusemajne, ĝis atingi 15 minutojn ($7\frac{1}{2}$ minutojn ĉiuflanke). Infano pli ol 18-monata komencos per 1 minuto dum la unuaj 2 tagoj kaj aldonos 1 minuton

ĉiudutage, ĝis atingi 20-30 minutojn (10-15 minutojn ĉiufanke).

Anstataŭ devigi la infanojn resti senmovaj dum la sunbano, estas preferinde lasi ilin liberaj, ĉar tiel pro ilia spontanea moviĝemo la sunradioj trafos ilin ĉiufanken. Kompreneble, ili prenos sunbanon nur dum bela vetero, kaj kovros la kapon per ĉapeto nur kiam la sunradioj estas tre fortaj.

La sunbanoj kune kun la racia nutrado estas la plej solida garantio de sano ĉe la infanoj en frapanta kontrasto kun la vakcinoj, serumoj, drogoj kaj aliaj falsaj rimedoj de la alopacia medicino.

En kelkaj okazoj (ekzemple, kiam oni ĝenerale ne eltenas la sunon) oni devas elmeti al la sunradioj nur la afekciitan korpoparton, lasante en la ombro la ceteran parton de la korpo.

Kiam oni celas ŝvitadon, oni devas kovri la korpon per tuko aŭ per arbofolioj en neventa loko, dum varma vetero. Oni komencas per 10 minutoj kaj oni aldonas 5 minutojn ĉiutage ĝis atingi 30 aŭ 45 minutojn. Ĉe la fino oni frotas la korpon dum 1 aŭ 2 minutoj per spongo aŭ tuko trempita en malvarma (aŭ apenaŭ tepida) akvo kaj iom premtordita. Poste oni sekiĝas.

Tiu sunbano kun ŝvitado avantaĝe anstataŭas la vaporbanon (en saŭno, k. t. p.), kiun ne ĉiuj personoj bone eltenas.

Se la sunbano (kun aŭ sen ŝvitado) okazigas al vi kapdoloron, kapkongeston, palpitation, k. t. p.,

apliku sur la koncernan korpoparton tukon trempitan en malvarma akvo.

Multaj el tiuj, kiuj ne bone eltenas la sunon povas nerekte profiti de la sunradioj sin elmetante nudaj al la sunlumo, sed en la ombro; ekzemple, sub la arboj.

Por ke la sunbano estu efikoplena, estas konsilinde atendi almenaŭ 5-6 horojn antaŭ la sapumado de la korpo. Tamen, se vi deziras tuj poste refreŝiĝi, prenu simplan duŝon.

HIDROTERAPIO

(kuracado per la akvo)

La akvo, tiu nepre necesa elemento de la naturo, estas grava kuracilo, kiu helpas restarigi la cirkulad- kaj nervan ekvilibron rompitan de la malsano.

Ĝi agas pleje pere de la haŭto, kies riĉa reto de kapilaraj angioj kaj nervaj fibroj transigas tiun agon sur la internajn organojn. Ĝustadire ne estas do la akvo, kiu kuracas, sed la reago de la organismo antaŭ la stimulo de la akvo. Tial la hidrotérapeŭto devas esti tre kompetenta kaj apliki tiun kuracilon ĝustatempe laŭ kelkaj elementaj reguloj kun speciala konsidero al la individua kondiĉaro de la malsanulo.

Ne apliku varman akvon al februlo, sed malvarman. Tamen, se liaj piedoj estas malvarmaj, unue revarmigu ilin per varma piedbano

aŭ litvarmigilo por ke la reago estu pli favora.

La korpo devas esti varma antaŭ malvarma apliko. Tial estas konsilinde ĝin fari tuj post ellitiĝo. Se la korpo ne estas varma, eĉ se nur la piedoj kaj manoj estas malvarmaj, oni devas unue revarmiĝi pere de marŝado, gimnastikaj ekzercoj, k. t. p. Vintre la (ban)ĉambro estu hejtata.

Post malvarma apliko atendu 15-30 minutojn por manĝi, ĉar la temperaturo de la korpo devas unue normaligi. Se necese, faru tiucele gimnastikajn ekzercojn, marŝu, k. t. p. Se temas pri maljunulo, malfortulo aŭ grava malsanulo, li devas enlitiĝi kaj revarmiĝi helpe de litvarmigilo. Post manĝo atendu 3 horojn por fari malvarman aplikon, evitante tiel diversajn (ĉefe digestajn) perturbojn.

Homoj tre maljunaj, malfortaj aŭ grave malsanaj devas esti singardaj pri aplikoj ampleksantaj la tutan korpon aŭ grandan parton de ĝi. Prefere ili konsiliĝu unue kun kompetenta naturkuracisto.

Kiam trafe indikita kaj farita, la hidroterapio sub siaj plej diversaj formoj senfebrigas, seninflamigas, trankviligas, sentoksigas, sendolorigas, stimulas la cirkulig-, digestkaj urinaparatojn, fortigas la metabolajn kaj endokrinajn funkciojn, beligas la haŭton kun siaj aneksaĵoj kaj havigas sanigan efikon en granda kvanto da malsanoj kaj perturboj.

Ĝenerale virinoj dum menstruo

sin detenos fari hidroterapiaĵojn.

Mergobano. — La paciento mergiĝas en la akvon de la banujo ĝis la kolo kaj restas tie dum fiksota tempodaŭro; dume oni malsekigas la kapon per la sama akvo.

La malvarma mergobano, precipe rekomendinda dum alta febro (pli ol 39°C), estigas intensajn nervan, cirkulan kaj termikan reagojn. Tial ĝi devas daŭri nur kelkajn sekundojn, kaj estas aplik-ebla sole nur al fortikuloj.

La tepida mergobano, kiu daŭras 10-20 minutojn, preskaŭ ne estigas tiajn reagojn (aŭ ili estas tre malfortaj) kaj estas rekomendinda ĉe sendormeco, nervozeco, k. t. p. Aldonante al la akvo 1 aŭ 2 manplenojn da amelo (aŭ dekokto de malvofloroj aŭ de brano de tritiko) ĝi tre utilas ĉe jukado, ekzemo kaj aliaj dermatozoj. Ĉe Bazedova morbo (hipertiroidismo) kaj ĉe takikardio (troa rapideco de la kora pulsado) prenu la mergobanon laŭ jenaj temperaturoj: la unuan tagon, je 35°C; la duan tagon, je 34°C; la trian tagon, je 33°C; ĉiun sekvantan tagon malpliigu 1°C, ĝis atingi 28° aŭ 29°C, kaj tiam daŭrigu ĉiutage je tiu-ĉi lasta temperaturo, se eble. Ĉe febro oni prenas la mergobanon je 3 aŭ 4°C malpli ol la temperaturo de la korpo.

La varma mergobano, kiu deprimas, kiam ĝi estas tro longa, havas limigitajn indikojn ĉe malfortuloj, senmineraliĝintoj, k. t. p. Ĉe rena koliko prenu ĝin dum 15-30 minutoj, kaj ripetu ĝin, se necese; aldonante

de temp' al tempo akvon pli varman por ke la temperaturo de la bano restu la sama. Dume surmetu malvarman kompreson sur la kapon.

Sidbano. — Plenigu larĝan pelvon (aŭ kuvon aŭ tinon) per akvo kaj sidiĝu en ĝin tiamaniere, ke la nivelo de la akvo atingu vian umbilikon. La krurojn ne enakvigu. La sidbano daŭras proksimume 5-15 minutojn kaj povas ripetiĝi en la sama tago, se necese.

Malvarma, ĝi utilas ĉe febro, inflamo aŭ kongesto de abdomenaj kaj pelvaj organoj, hemoroidoj, k. t. p.

Tepida, ĝi estas rekomendinda ĉe sentivaj hemoroidoj, kiuj ne bone eltenas malvarman akvon.

Varma, prenu ĝin ĉe inflamo de la urinveziko, malfacila kaj dolora menstruado, k. t. p.

Trunkobano. — Ĝi similas la sidbanon, sed la paciento devas duonkuŝiĝi en la akvon por ke lia dorso enakviĝu. Tiucele iom pli ampleksa ujo estas necesa. Krurojn, brakojn kaj bruston ne enakvigu.

Oni prenas la trunkobanon: malvarma, ĉe alta febro; tepida, ĉe sendormeco, nervozeco, arterisklerozo; varma, ĉe rena kaj hepata kolikoj, lumbago, k. t. p.

La trunkobano povas iel anstataŭi la mergobanon, kiam granda

banujo ne estas havebla.

Frotado de la malsupra parto de la ventro. — Plenigu grandan kuvon per 20-30 litroj da malvarma akvo kaj metu sur ĝin tabulon; senvestigu la malsupran parton de via korpo kaj sidiĝu sur la tabulo (tio signifas *super* la akvo; ne *en* la akvo); prenu tukon aŭ spongon, trempu ĝin en la akvo de la kuvo kaj frotu milde la malsupran parton de la ventro de la umbiliko ĝis la generaj organoj (ne tuŝante tiujn-ĉi) kaj de unu ventra flanko ĝis la alia, kruce. Trempu denove la tukon en akvo kaj ripetu la saman frotadon kaj tiel sinsekve kaj seninterrompe dum 8-10 minutoj. Rimarku, ke oni nur devas frotadi la malsupran parton de la ventro kaj tiu frotado ne devas esti energia. Se vi ne volas malsekigi vian manon dum la frotado (ekz. se vi suferas reŭmatismen en la manoj), ligu tiun tukon aŭ spongon al pinto de vergeto aŭ stangeto. Se vi estas malforta, faru tiun frotadon dum nur 4-5 minutoj, kaj vi eĉ povas ĉe la komenco uzi akvon ne tute malvarman, ĉefe vintre. Post kelka tempo vi kutimiĝos uzi ĝin malvarma; kaj tia ĝi estas pli bonefika.

Se vi ne havas tiucele taŭgan kuvon, uzu bideon; sed renovigu kontinue la akvon dum la frotado.

(*Daŭri gota*)

Japana libro de 1970 vendita ĝis nun je pli ol 1,200,000 ekzl.

Isaiah Ben-Dasan: La Japanoj kaj La Judoj

en trad. de T. Nakamura aperos en "Oomoto" ekde la venonta numero

La Pinbosko de Anykščiai

Tradukis Klemensas Naudzius

180. Tra l' animoj de l' litovoj fluetante, ondante,
Kiel zefiret' ebene tra herbajoj fekundaj,
Lulis, balancis, inundis per ondaro malhela.
Ofte en arbar' litovo esploras senkonscie :
He li nur sentas plej klare, ke la kor' ne suferas,
185. Ke ĝi, plen-plena de sentoj, milde emociiĝas,
Kvazaŭ rospertoj abundaj revivige efikus —
Kvazaŭ ros' tra la vangoj rulfalsetus larmgute.
Longe post tio en brusto spiras, ondas arbaro.
Samtiel ankaŭ la brusto ĝemas, onde luliĝas.
190. Kvazaŭ sopir' en animon tiel funde kaŝvenus,
Ke la anim', kiel spiko, peze teren kliniĝis.
El tio larmoj kaj ĝemoj, el tio sentoj sanktaj,
El tio kantoj naskiĝas perle en korprofundo.
Ĉio, ho ve, forperei. . . sur la terspaco nuda
195. Kelkaj nur pinoj malrektaj restis solaj mizeri.

- Se sur ĉi elhakitejo monteca bruligita
Tiom multaj pasintaĵoj en la koro ekĝermas :
Kvazaŭ stumpoj forputrintaj reviviĝas kaj verdas,
Kronojn el pintoj de arboj flagrigas ventospiroj,
200. Kvazaŭ la nudaj areoj per strobiloj kovritaj,
Buntas per punktoj de fungoj, pufas muska sternaĵo,
Kvazaŭ el inter putraĵoj venus tia aromo,
Ke arbaro kvazaŭ krevus aŭ pinaro spirblovus,
Kvazaŭ ĉio, jen, ekflustrus, jen, ekkantus, ekbruus,
Kiel en arbar' malhela dum matena aŭroro.
205. Se sur ĉi nuda tereno, kiam penso surpluvas,
Monumente fruktigita arbarego repulsas,
Kia ĝi estis antaŭe, en la tempoj jam foraj —

- Kun serena trankvileco, kun rememoroj amaj,
 Kiam morozaj densejoj regis sur ĉi supraĵoj,
 210. Kiu mem ne konis stumpojn — eble nur flanko vidis,
 Kiam arbotrunkoj dikegaj, daŭre solidiĝintaj,
 Laŭ la esprimo de avoj, staris ŝultron ĉe ŝultro,
 Kio pruvas, ke ĉi tie dormis, sonĝis arbaroj,
 Supre kun densa tegmento, el arbpintoj teksita :
 215. Kaj ne nur ursoj kaj aproj are naskis ĉi tie,
 Ankaŭ bizonoj²³⁾ potencaj tenis sin en densejoj.
- Kie nun estas pinbosko, sanktaj arbaroj praaj,
 Pro iu kruda miskaŭzo pratempe elhakitaj.
 Eble Jogaila²⁴⁾ ekstermis ilin dum kristanigo,
 220. Por ke l' patrujo ne servu al la dioj paganaj.
 Poste sur ĉi ebenajoj, sur malnova stumparo,
 Pinoj semiĝis, elkreskis dum la daŭro centjara :
 Densaj, altaj kaj glatrektaj, flavaj, kiel kandeloj,
 Pintoj iliaj laŭtmuĝis, trunko tuŝegis trunkon.
 225. Ja rememoras olduloj stari sur ĉi sablejoj
 Belajn kaj vastajn kverkarojn el la praa epoko.
 Laŭfragmite ili sveltis, verdis samkiel rutoj,
 Trunkoj, branĉaro, radikoj estis firmaj, fortikaj.
 Sanktaj ĉi arboj litovaj ne suferis nudecon :
 230. Vintran folion ruĝetan alternis freŝa, verda.
 Estis grizaj laŭ olduloj, per likeno garnitaj,
 Estis fortaj kaj solidaj kiel viroj maturaj,
 Plaĉaj por vido, ĝentilaj kiel niaj junuloj.
 Longe restadis post tio teda elhakitejo.
235. De Puntukas²⁵⁾ eĉ ĝis Ŝlave la prakverkojn multnombrajn
 La popolo konsideris sia granda sanktaĵo.
 En unuec' ili vivis, protektataj de l' dioj,
 Kiu arbare restigis multon da monumentoj.
 Portis diablo ŝtonegon domgrandan tra l' aero, —
 240. Eble celante frakasi la templon de Anykŝĉiai²⁶⁾
 Aŭ riveran fluon bari, — sed apenaŭ ekvidis
 La sanktan kverkaron, ho ve! koko ekkriis, kaj li
 Tuj, el la ungoj lasinte, batis ĝin en la sablon,
 Eĉ la tero ekstremegis, oldaj pinoj falegis.
 245. Poste l' litovoj bruligis dankoferojn sur ĝi,
 Ĉar la dioj ilin gardas, vestkovras, panon donas.

Kvankam la teron plugiloj deskrapis, tamen eĉ nun
Multe da kverkaj stumpegoj putras en la Puntukas.
Du grand-olduloj ĝis nune apud vojo staradas.
250. Pintoj iliaj verdetas, sed la branĉoj jam sekas.
Homoj daŭre ilin ŝatas, eĉ radikojn prigardas,
Iu, pro malsan' veante, laŭ jurpromes' vizitas.

Tra la ebenoj kaj valoj tiliar' etendiĝis :
Tie ĉi — bosko miksita, tie — nur unuspeca.
255. Dumsomere per flaveta florolakto ĝi blankis,
Per abelaroj zumadis, per mielo odoris,
Al la homoj estis ama, bonvenige afabla
Kaj gajninda ĝis la fundo kiel vera litovo.
La floroj nutris abelojn, faris dolĉan mielon,
260. Pelis for kun ŝvitabundo malsanojn de l' litovoj,
Per la bast'²⁷⁾ sanigis vundojn, senfebrigis furunkojn,
El trunko ĝi donis fundojn tabulajn por bareloj,
El la ŝelfibro bastŝuojn por piedvesto simpla.
Kaj eĉ ne branĉeto restis senutila por uzo.
265. Oni faris korbojn, arkojn aŭ starigis barilojn,
De l' radikoj ĝis la pinto ĉio estis valora.
Ie estis karpenaroj, sed karpen' malaperis,
Nur ie — tie teleroj el karpenligno restis.
Ie troviĝis diversaj arboj sufiĉe raraj.
270. Folihavaj senfloraj kaj pinglohavaj kun floroj,
Trafajn nomojn al la arboj donis iam spertuloj,
Ĉiujn ilin homoj flegis, eĉ se ne ĉiujn konis.

Tia arbar' etendiĝis tra la lando litova,
Ĉiuj surfacoj plenverdis sub malhela ombraĵo,
275. Ĉiuj pintoj unuece kunplektiĝintaj estis —
Kiel koroj de l' litovoj en unu patrolandon.

La litovoj en konkordo ĉiam kun arboj vivis,
En juneco konatiĝis, kunvivante oldiĝis.
280. Lignofajron la litovo en litovo en terkavoj bruligis.
Pordoj ne estis tabulaj, sed el branĉoj plektitaj.
Eĉ ne unu sana trunko forhakita falegis,
Nur iom putrantan arbon oni juĝis renversi,
Ĉar tielsame l' arbaro, kiel ĝi povosciis,
285. La litovon konsoladis, ĉiam sindone amis.

- Per la bestoj, birdoj, fruktoj ĝi lin vestis kaj nutris,
 Eĉ malamikon frakasi — falante — ne rifuzis,
 En tag' minaca kaŝejon donis kontraŭ teruroj,
 En tag' angora ĝi bildon de trankvilo prezentis,
 290. En tag' gajiga — abundon de diversaj belaĵoj,
 Ĉiutempe kaj por ĉiu — plej diversajn bonaĵojn.
- Homoj mortis pro malsato (tia fato okazis),
 Supon el arbŝeloj faris, muskon bakis en panon.
 Pro malsato per arbŝeloj sin nutrintajn homidojn
 295. Trafis pest-epidemia kaj abunde forfalĉis.
 La arbaro kondolencis, per ros' ilin priploris,
 Altajn pintojn nuben mergis kaj ĉi tiel alvokis :
 "Kontraŭ malsat' vin defendu, ho fratetoj! Benita
 Estu la mano, hakilon por la mond' eltrovinta!"
 300. La unuaj ne sen larmoj nur malmulton elhakis,
 Filoj iliaj veante tiel savis patrujon,
 Ties nepoj priĝemante jam ne ŝparis arbarojn,
 La pranepoj veturigis al urbeto por vendi,
 Eĉ po kvardek veturiloj ili tien liveris,
 305. Ĝojis potage almenaŭ moneron ricevinte, —
 Arboj pro tia abundo, vidu, restis malkaraj.
 Oni ĉi tiel malŝparis eĉ ĝis tute ekmankis,
 He ja plejparte pro brando ili tiel trouzis :
 Ĉar ĉiuj iĝis malvirtaj, kiel tribo hebrea.
310. Niaj gepatroj trovinte ne plu la praarbarojn,
 Fratan promeson akceptis — cedi kampon por bosko.
 Pro arbaro sopirante, ili ofte per larmoj
 Malsekigis la palpebrojn, al stumpoj rigardante.
 Ĉar animoj de l' litovoj, per arbaroj nutritaj,
 315. Meze de olda arbaro fekundas, do sur nudaj
 Senarbaraj kampspecoj ili kvazaŭ eksurdas,
 Kvazaŭ nur velkas de suno kaj mizeriĝas lante.
 Malgraŭ, ke nune litovo sur nuda kamp' naskiĝas,
 En kant' arbaron aŭdinte, sen ĝi pacon ne trovas.
320. Arbarojn amis kaj ŝate prikantis la prauloj, —
 Ĉiujn ĉi kantojn la avoj sciis bele kantadi.
 Pro arbaro sopirante ili flegis pinboskon :
 Ĉiutage ĝin venadis, ĉiun angulon zorgis,
 Kaj tiel kreskigis belan, kiel scirpoj, pinaron,

325. Junajn korojn kaj animojn de l' idoj konsolante.
Kaj ĉiutage gardadis kiel trezoron grandan :
Ne nur arbon, eĉ vergeton senbezone ne rompis.
Ĝojis Anykŝĉiai, esperis pri sia pinbosko.
Fremdajn arbarojn veturis por hejtlignon aĉeti.
330. Ve, alveturis forstisto, la pinboskon pritaksis,
Gardistaron tuj instalis, kavojn laŭvoje fosis,
Malpermesis kaj paŝtadon kaj fungo-kolektadon,
Kaŝe arbaron vendadis, noktotepe ĝin hakis,
Al estraro mensogaĉis, al la homoj plorantaj
335. Ŝtopis la buŝojn per pugnoj, mergis en sangoflakon,
Kaj trudis al la Anykŝĉiai ĉiutage ĝin sarki,
Ĉio tute dezirtiĝis, restis elhakitejoj. . .

- Restis ĉi montoj senarbaj, kalvaj kaj multestumpaj,
Per plorlarmoj priverŝitaj, per kantoj menciitaj.
340. Kaj la kanto ne finita : kiam kor' ekdoloris,
En la animon ŝtelvenis maltrankvila angoro.
La sama potenco, kiu la arbarojn forrodis,
Peze surfalis l' animon. . . rompis ankaŭ la kanton.

(1859)

(*Datrigota*)

G L O S A R O

- 23) Bison bonasus bonasus (sciencistoj nomas ĝin ankaŭ Bizono litova).
24) Jogaila — litova grandduko, 1386-1434 reĝo de Polujo.
25) Nomo de rivereto.
26) Urbeto en orienta parto de Litovio : elparolu : Anikŝĉjai.
27) Basto — ĉi tie estas komprenata ne ligna fibro, sed la sukcon portanta viveca tavolo de la arbĉelo (latinlingve cambium)

nova Zamenhof-strato

Post la vizito en Roubaix-Tourcoing de J. Umeda kaj M. Sawada, la urba konsilantaro de CROIX (Norda Francujo) decidis nomi straton laŭ la nomo "rue du Docteur Zamenhof".

La inaŭguro estos la okazo por landlima renkontiĝo de Nordfranca Esperanto-federacio kaj traduka konkurso. La dato : dimanĉon la 25an de marto 1973.

Informoj ĉe : Esperanto, 3 allée Béranger, F-59170 CROIX

Al triumfanta mond-koncepto

(Diadalmaş világ-nézet-hez)

(3)

Bátor observis ŝian serĉaŭ rigardon antaŭan kaj aliris al ŝi.

— Kio estas al vi *Kiĉim*? Ĉi dorlota vorto alparola elglitis el lia buŝo senpripense. Li ne scias kiel. . . Ĉi vorton li aŭdis de sia patrino, kiam estis infaneto. Ĝi signifas “mia eta” (infano). . .

— La ektimo min ekkaptis, sed ĝi jam pasis for.

— Estus tempo por kuŝiĝi, li diris.

Hétfalusi daŭrigas :

— Oni ne konas ankoraŭ la funkcion de la ĉelo-kerno, kiu plejparte konsistas el kunmetitaj albuminoj kontraste al la simplaj albuminoj de la protoplasmo. La ĉelo-kerno enhavas la nukleoacidon, kiu ludas grandan rolon en biosintezo de la albuminoj kaj en la renoviĝo de la ĉeloj.

Se ni prikonsideras, ke la senĉesa ŝanĝo, pri kiu parolis Bátor, okazas ne nur en unu ĉelo, sed en plurbiliono da ĉeloj de la plenkreska homo, tiam konturiĝas en sia tuto la malfacileco

de la problemo pri identeco, pri reviviĝo.

Hétfalusi parolis ankoraŭ pri la elektro en la ĉeloj kaj pri la aŭto-katalizita cirkulo, kiu, se estiĝas inter la produktoj de la materiala disfalo, troviĝas tia substanco, kiu katalizite (katalizatore) akcelas la rekonstruon de la donita diseriginta materialo. Sed Ŭde ne povis lin sekvi. Kun la mastrino ŝi eliĝis el la grupo kaj ekiris al la domo por enlitiĝi.

* * *

La sekvantan matenon, kiam Ŭde rakontis pri sia dubo, kiu ekkaptis ŝin dum la prelego de Hétfalusi, la respondo de Iró estis kurta :

— Hodiaŭ nur per nasko oni povas realigi la reviviĝon. Ĉe via flanko estas Bátor, turnu vian belecon al li, ankaŭ vi reviviĝos.

— Ĝuste li asertas, ke tio ne estas reviviĝo, nur reprodukto.

— Jes, li pravas, sed hodiaŭ la homoj nur en la infanoj povas reviviĝi. Ili frapetas sur la pordo kaj via

respondo estas ne! Kion fari?

Li nenion diris plu kaj foriris kun sia edzino ĵus alveninta por ripozi en duo. Ŝi restis sola kaj rigardis post la geedzoj Iró, ĝis ekkaptis ŝin la malforteco, senpoveco. Tiam ŝi ekpaŝis malrapide laŭ la rivereto, la sola kunulo en ĉi momento, al la direkto de Ŝarga-fonto...

Lelkeŝ jam aŭrore forlasis la kuŝejon kaj en la miljara silento, apud Ŝarga-fonto, inter la rokoj promenadis sola kaj meditante.

Estas multa konflikto inter la scienco kaj la instruo de la eklezio. Tial estas ankaŭ inter Iró kaj mi multa diferenco. Ĉio, kio disigas min de li kaj de aliaj homoj fontas el ĉi konflikto...

Komence de tio, ke ne estas morala kaj moderna la sutano, ke ne estas natura la senvirina, seninfana vivo, ke ne estas korekta la instruo de la eklezio, kiam oni diras, ke Dio farinte argilan pupon, enspiris animon en ĝin kaj tiel naskiĝis la unua viro. Same ne korekta estas la alia infanfabelo, pri la kreo de la virino el ripo de la viro ktp.

Se la eklezio ne pretendus, ke la homoj kredis en ĉi fabeloj kaj en sen-nombraj similaj, tiam ne estus diskut-ebleco senutila inter la kreduloj kaj la homoj, kiuj konas la plej freŝan rezulton pri la origino de la vivo. La eklezio starus sur vera bazo kaj en

konkordo kun la intelektularo.

Ĉu estas ideale kredi en malplena simbolismo anstataŭ en kreanta ago kun senfina perspektivo, staranta sur leĝoj de la naturo?

Ĉu estas home kredi en tio, kio ne estas vera? Kredi en hosti-vino anstataŭ en realigo de grandaj taskoj?

Ĉu estas korekte konsideri homon stranga, ĉar li volis solvi la problemon de la fotosintezo?

Ĉu estas utile perdi la tempon kun primitiva preĝado kaj kun malplena ceremonio anstataŭ ripozo kaj movo en libera aero aŭ legado de libroj kun fekundigaj pensoj?

Ĉefe: Ĉu estas morale mobilizi la amasojn al sangaj bataloj por defendi la dogmojn kun celo, defendi la monakiran profesion senutilan pro la malplena enhavo, anstataŭ plenumi edukon pri universalaj kulturvaloroj?

Vane! — konkludis jam tute klare Lelkeŝ. La natursciencoj pensantaj homoj kies nombro salte kreskas de jaro al jaro, venkos la dogmojn. Tio estas nur problemo de tempo!

— Bonan matenon sinjoro Paroĥestro! Kial vi estas tiel serioza, ke mi ne diru trista? demandis Ŭde.

— Kial? Ĉu vi povus kompreni? Tuta mondo renversiĝis en mi, de aŭroro ĝis nun.

— Kiel?

— Ĉiam pli ofte mi aŭdas de la adeptoj: kion donas al mi la eklezio?

Preskaŭ nenion, diras la alia. Kion mi bezonas, mi ne trovas ĉe ĝi. La eklezio nur pretendas, sed nenion donas al mi ktp.

Imagu, Ĉalanin eĉ ekkoleretis al mi ĉe monto-domo apud Meleg-fonto, ĉar mi ne povis doni respondon al ŝia denova demando: “Kial kuniĝas kaj kial disiĝas la homoj, kiuj amas unu la alian?” Kiam mi respondis, ke nur Dio scias tion kaj ni devas kvietiĝi en la volo de Dio, tiam ŝi jene daŭrigis: kiu estas tiu kruela fripono, kiu forŝiris de ŝi sian amatan edzon?

Jen, kion mi povas respondi, fari?

— La teologio devas progresi kun la helpo de la sciencoj. Volis lin konsoli Ŭde.

— Ni lasu ĉi temon! Sed ankaŭ vi ne radias pro la feliĉo, kara Ŭde. Mi konfesis al vi. Sincere! Pli detale, jes, sed pli sincere ne eblas. Konfesu ankaŭ vi al mi. Kial estas ankaŭ vi trista?

Kiam la knabino ne respondis, li diris:

— Vi estas juna, bela kaj apud vi estas honesta junulo Bátor. Vi neglektas lin, io ne estas en ordo.

— Ni ne parolu pri tio!

— Kial? Diru al li jes kaj faru eklezian geedziĝon. Tio estas bona kaj bela. La ceremonio devas esti arta por tia evento.

Ŝajnas, ke la homoj ne povas liberiĝi de la malnovaj kutimoj tuj post la decido, pensis Ŭde, sed ŝi jene respondis:

— Lasu min, mi petas! Pli bona por mi sola!

— La solecon serĉas, kiuj estas tristaj. Ankaŭ mi pro tio venis tien ĉi. Kial vi ĉagrenas?

— Vi ne povas kompreni min. Vi estas kontraŭ mia pensa enhavo. Hieraŭ vespere mi devis paroli kontraŭ vi, kion mi ĝis nun neniam faris.

— Nur ekstere estas mi la malnova. Kредu, ankaŭ mi komencas ekkoni vian mondon. Mi kompatis vin... Tial mi parolis kontraŭ Bátor, kiu atakis vin preskaŭ tiel kruele, kiel Iró min post la enterigo de Ĉalán sur la pinto Kiláto. De tiam mi ekkonjektis senfinan eblecon, je kiu la eklezio ne povas doni veran respondon, aŭ donas fabelan, preteran aŭ eĉ falsan.

— Ĉu vi kredas en la eblecoj de la realigo?

— Mia propra cerbumado, la dialogo kun Iró sur la pinto Kiláto kaj la virus-eksperimentoj de Stanley ŝajnigas, ke ĝi kvankam komplika kaj bezonas longegan tempon — tamen estos ebla. Mi kredas jam eĉ tion, ke la scienco donos respondon ankaŭ je la demando de Ĉalanin.

— Vi komencas konsoli min. La

egeco de la tasko premadas min. Via nuna opinio iom trankviligas min.

— Viaj pensoj estas pozitivaj kaj sekvas progreso, do vi povas esti gaja, sed la mia, kiun mi reprezentis kondukas al fiasko.

— La malnova pensado jes, sed la renoviĝo kun pozitiva eduka enhavo same rikoltos sukceson.

— Sed por tio mi ne ricevas monon.

— Neglektu la malnovan, nur la monon enspezu kaj pretigu vin por la nova kaj ni vidos.

— Kaj vi pretigu vin al nupto, estu gaja, nur paralele okupiĝu pri la origino de la vivo.

— Ŝajnas, ke vi volas ordigi mian vivon kaj mi la vian, anstataŭ, ke ĉiu ordigu la sian.

— Jes, tiel ŝajnas, diris Lelkcŝ, sed estas ioma diferenco. Vi ne volas obei, kvankam mi jam decidis ekiri sur nova vojo. La hodiaŭa aŭrora cerbumado ĉe Ŝarga-fonto estis la lasta kaj nun alvenos la agoj. Mi estis ĝis nun fremda inter vi. La sola senco de mia ĉeesto estis: esti ili por Iró t. e. diskut-kunulo por kristaliĝi ĉe li la ankoraŭ dubaj punktoj. Ĝis nun mi ne vidis klare, pro la abundo de la negativoj, la pozitivan eblecon por eliri. Ĉi societo ekmontaris la konturon kaj mi obeas. . .

Multe ili priparolis ankoraŭ kaj dume promenadis. Altagmanĝe, kiam

Lelkeŝ diris, ke nur unu ne plaĉas al li, ke ĉe Iró tro hiperas la scienca vidpunkto, Ŭde ekvidis la geedzojn, kiuj proksimiĝis al ili. Pro la rideta instigo de Ŭde, Lelkeŝ devis ripetisian opinion ankaŭ al Iró.

— Mi konsentas kun vi en ĉio, nur ne hiperu tiel krude la sciencan mondkoncepton, ĉar ĝi povas iĝi tre tre unuflanka, kio ne estas bon apor la homoj.

— Kiel vi komprenas ?

Ŭde rapidis ekspliki al Iró en kelkaj frazoj, pri kio ili parolis. Iró kompreneme aŭskultis kaj fine diris :

— Ne timu sinjoro Paroĥestro! Kiel Ĉalán ne rezignis, ankaŭ mi ne rezignos pri la beleco de la vivo. Kiuj ekskursis kun Ĉalán neniam forgesos kiel li povis delecti sin en la ludo de la kaskadoj aŭ kiel li plezuris pri la naĝado de la ŝafid-nubaro surĉiela. Ŭde nelonge fabelis pri tio, kiel ŝi ree travivis malnovan ekskurson kun Ĉalán ĉe Fekete-fonto. Mi mem rememoras, ke vintre, okaze de urbĉirkaŭa promenadekskurso, kiam surprizis nin la hirte flirta neĝado, kiel daŭre li povis rigardi la dancantajn flokojn de la petola vento. . .

Do, ni ne rezignos pri la beleco kaj donaco de la naturo nur pro tio, ke ni scias, ke la akvo estas H₂O. Sed nek inverse: ni ne kontentiĝas nur kun la beleco ignorante la veron, la sciencan konon, — la frukton de

la naturo aŭ la bonecon de la homoj.

Per aliaj vortoj: Estu la scienco, moralo kaj beleco ĉiam en perfekta harmonio t. e. la ekvilibro ne ĉesu! Eĉ por unu sekundo ne!

— Jes, nun mi komprenas vin plene, via devizo estas: Diadalmaŝ világnézet t. e. triumfanta mondkoncepto, kiu estas la titolo de libro, verkita de la bonintenca romkatolika episkopo de Sékoŝfehervár. Li klopodis, sed ne povis alveni al ĉi mondkoncepto, ĉar katenis lin la dogmoj. Ĉe mi la hodiaŭa aŭroro ilin absolvis.

— Ĉu vi bedaŭras tion? demandis Iró.

— Antaŭ ol respondi, permesu al mi la lastan demandon: Ĉu vi negas aŭ asertas, ke la kazoj, aĵoj povas ekzisti eĉ, se ni ne scias pri ili?

— Jes, sed...

— Kial la sed?

— Sed! Ĉar se ni ne scias pri ili, ni ne havas rajton prezenti ilin veraj, pretendi, ke oni konsideru ilin realaj, kaj se iu ne faras tion, mi ripetas; ne havas rajton lin priridi, fiigi, aĉigi aŭ mortigi. Jen kial la sed! Kaj nun sekvu la lasta vorto!

Dum la diskuto la korpo de la

Utafesta Poemaro

1966 105p. Bind. Prezo: \$ 2.00

— Originalaj poemoj elektitaj el la kontribuoj por la Uta Festo de la Oomoto-Internacia Festivalo, okazigita post la 50-a U. K. Tokia. —

du viroj kliniĝis unu al la alia. Ilia rigardo kuniĝis ĝis la fundo de la animo, kion sekvis forta manpremo...

— Se vi ne elsentas la respondon el mia manpremo, se vi ne divenas ĝin el mia rigardo, tiam mi povas esprimi min ankaŭ per vortoj: mi ne vane konstatis pri vi, ke vi estas la posteulo de Táltoŝ, la pagana pastro, kiu tipo dum la kristanaj jarcentoj ne ekstermiĝis tute, sed evoluis, perfektigis kaj transformigis je moderna pedagogo de sia popolo. Tiajn pedagogojn formi ne povas hodiaŭ la eklezio. Eble en la kapo de papo Johano, la 23-a kaj de aliaj posteuloj konturiĝos la plena reformo, kiu kreos la bazon de sana instruo...

— Mi deziras sincere el mia tuta koro, ke la eklezio transformiĝu je moderna pedagogo de la homaro, finis la diskuton Iró kaj nek Lelkeŝ rompis plu la silenton...

Ilia rigardo kaj manpremo estis senmovaj, la interkompreno ŝajnis poreterna... Ili staris tie en la mezo de la arbaro kvazaŭ estus ilin kunfandinta je roko la surzenita suno.

(Fino)

La pandetranĉaĵo

Temis pri ia evento, se ĉe ni hejme oni komencis detranĉi la nove bakitan panon. La patrino manprenis la panon, krucsignis ĝin kaj poste ĝin detranĉis ĝuste tie, kie estis la plej granda kunbakaĵo, kiu, kiel vi certe scias, multe pli mordkraketas ol la aliaj panŝeloj. “Al kiu ĝi apartenos?” ni ĉiam demandis kun la fratino, kaj dume niaj dentoj preparis sin por la mordkraketa frandaĵo.

Ofte okazis, ke la patrino ektranĉis la panon pli frue ol ni hejmenrevenis. Kiu venis la unua, serĉis la detranĉaĵon, ĉar mi kaj la fratino ĉiam kalkulis, kiom longe la pano eltenos. Anstataŭ saluti ni ĉiam komencis kribi: “Patrino — patrino, mi petas, kien vi metis la pandetranĉaĵon?” Kutime ĝi estis deponita en la kaserolo. Kaj tiel tiu, kiu venis la unua, komencis frandi.

Kiam la fratino venis la unua, ŝi estis tiu, kiu formanĝis la pandetranĉaĵon kaj mi koleris kaj ofte eĉ duonbedaŭre ploris kaj riproĉis la fratino. Male, kiam mi hejmenrevenis la unua, mi faris same kaj sentis grandan kontentiĝon pri mia ŝtelaĵo kaj pri la senluziigo de mia fratino.

Ĉion ni kapablis inter ni dividi; neniun bakaĵon estis al ni tiom rara kiel ĝuste la mola pandetranĉaĵo.

Foje okazis miraklo. Mi hejmenrevenis el la lernejo pli malfrue ol la fratino. Sur la tablo kuŝis la freŝe detranĉita pano. La patrino staris ĉe la kameno, la fratino ĝuste forestis en la kuirejo. Jam mi komencis amare engluti la salivojn, kiam mi demetis la librojn kaj kajerojn sur la benkon apude. . . . sed subite mi rerigardis la panon kaj — neniam mi estus atendinta ion similan — ĉe la pano kuŝis duono de la freŝa pandetranĉaĵo. Mi estis tiom surprizita, ke mi eĉ ne kuris al ĝi.

Mi demandis la patrinon, ĉu tio estis la fratino, kiu lasis al mi la duonon. La patrino kapjesis kaj aldonis: “Vidu, kiel bona ŝi estas!”

Mi prenis la duonon de la pandetranĉaĵo en la manon kaj eksentis fonton de tiom stranga tenero, kiun mi ĝis nun absolute ne konis. Mi ekmordis la duonon — kaj nova ekmiro! Kiel strange ĝi gustis! Vere, nek la migdaloj ne ŝajnis al mi tiom bongustaj, kiam mi ilin tranĉis en la paston por la patrino. Ne nur la

unua manĝopeco, sed ankaŭ la aliaj pluaj gustis same bonege kaj kiel neniam antaŭe.

Kion la duonpandetrancĵo kaŭzis! La fratino ŝajnis al mi esti tute alia ol antaŭe. Ekde tiu tago mi amis ŝin pli multe kaj pro dankemo ankaŭ mi lasis por ŝi la duonon, se ŝi venis pli malfrue ol mi hejmen.

Tio estis tre belaj momentoj, kiam ni unu al la alia donis la duonon de la pandetrancĵo! Kaj kioman ĝojon sentis la patrino! Ŝiaj okuloj brilis — kaj iam eĉ larmoj aperis en ili. . .

Ekde tiu tago mi neniam estus manĝinta la tutan pecon da pandetrancĵo. Mi bone sciis, ke ĝi ne tiom fabele gustus kiel pruvo de reciproka amo kaj komprenemo.

..... Multe da jaroj forpasis. Mi estis malproksime de mia hejmo kaj ofte manĝis la pandetrancĵon sen mia fratino. Sed kiam mi hejmenrevenadis libertempi, inter aliaj

donacoj atendis min ĉiam ankaŭ la pandetrancĵo. Ne, tiam ŝi devis preni la duonon, sed sen ŝi mi ne estus ĝin formanĝinta kun bona gusto. Ĉiuokaze kaj ĉiam tiu ĉi pandetrancĵo signifis por ni ian novan festenon de l' amo inter la fratino kaj mi.

Eĉ kiam mia bona fratino pli poste edziniĝis kaj mi post multaj jaroj de restado en eksterlando vizitis ŝian novan hejmon, la prezentita al mi pandetrancĵo estis kiel signifo de l' estimo plej rara kaj kara.

Kaj ĝis nun ni estas kiel infanoj. Niaj rilatoj de reciproka solidareco dum la tempopaso nur profundigis, riĉigis, sed efikas ĉiam tiom feliĉigo kiel tiam, kiam ni la unuan fojon dividis kelke da paneroj de freŝe bakita pano.

La pandetrancĵo fariĝis por ni simbolo de senprofita amikeco, kiun ni neniam rompis.

(Trad. Cíhová Jana, Ĉeĥoslovakujo)

(daŭrigo de p. 137)

Dum la ĉi-jara Kongreso de Japanaj Esperantistoj ni faris proponon inviti la venontjaran, 60-an Kongreson de Japanaj Esperantistoj al la urbo Kameoka, la sidejo de nia Centro. Kaj tiu nia propono estis varme akceptita kaj unuanime aprobita de la tuta Kongresanaro. Pri tio, mi kredas, ke unu el niaj aranĝantoj poste faros al vi iom pli detalan informon. Sed ĉi tie mi nur volas diri, ke la kongreso ĉe Kameoka okazos en la mezo de aŭgusto venontjara, kaj mi jam petas al vi: se vi havas planon vojaĝi al Japanujo, aŭ se ne, bonvolu starigi tian planon, kaj ĉiuokaze ĝin aranĝi tiel, ke vi povos partopreni samtempe la 60-an Japanan Kongreson kaj nian Oran Jubileon ĉe Kameoka! Mi certigas al vi, ke ĉiuj japanaj esperantistoj kaj ĉiuj oomotanoj bonvenigos vin kiel honorajn gastojn!

Abonprezo de Oomoto

Laŭlanda tarifo por 1 jaro

Lando kaj kotizo :	Bv. pagi al :
Argentino 19.40 pesoj.	S-ro Mariano Calvo, El Rastreador, 679 Barrio Liniers, Buenos Aires 8a
Aŭstrujo 91 ŝil.	D-ro Adolf Halbedl, Schmittstrasse 17, A-8720 Knittelfeld Konto: n-ro 37.330 ĉe Österr. Postsparkasse Wien
Aŭstralio 3.20 aŭs. dol.	S-ro F. R. Banham, 31 St. Andrew's Avenue, Rosanna, Victoria 3084
Brazilo 23.40 kruz.	Prof. Benedicto Silva, Cx. R. 17, 96 Monte Aprazivel, SP
Britujo 1.49 funtoj	D-ro A. Mildwurf, 71 Compayne-Gardens, London N. W. 6
Bulgarujo 4.2 levoj	S-ro Atanas Nikolov, Str. Alabin, 30-Esperanto, Sofia
Ĉeĥoslovakio 25.5 ĉ. kr.	S-ino Cichová Jana, Praha 9, u Svobodarny 12
Danlando 27.2 d. kr.	S-ro Ib Schleicher, Ved Bellahøj 21. 13-Kopenhago BRH
Finnlando 16 f. mk.	S-ro Jussi Jääntti, ESPERANTO, PL 7 SF-70101 Kuopio 10, (pĝk: KU 8344-1)
Francujo 20 f. fr	S-ino Renée Volpelière, Ul. 2018, 10 rue de la Servie, 30-Nimes (Gard)- Poŝtĉekkonto: Montpellier 1070-06
Germanujo	
DDR 8.6 mk.	S-ro Albert Klemm, Schwarzburger Strasse 5, Bad Blankenburg (Thur, Wald)
Grekujo 11.7 dr.	S-ro K. Zahariadis, Petrompei 4, T. T. 507, Thessaloniki
Hindujo 28.4 rp.	S-ro R. B. Joshi, K. L. Arts and Commerce College, Bagbahara (Dist. Raipur), M. P. State. Hindujo-India
Hungarujo 42.1 pengoj (forint)	S-ino Luisa Brichta, Budapest V, Bathory u. 19
Italujo 2265 liroj	Itala Esperanto-Federacio, a/c Maria Frus, Via Po No 7, Torino
Israelo 16.4 Is. funtoj	S-ro Ben-Alter Jehiel, Ta Doar 379, Petah-Tikva
Jugoslavio 66 din.	Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto Matije Gupca 27, ZEMUN.
Kanado 3.85 dol.	S-ro Gastao Florencio, 3537 Park Avenue, Montreal, I 30-P. Q.
Meksiko 48.8 pesoj	S-ro Shigenori Usui, Apartado Postal No. 18-926, Mexico 18, D. F., MEXICO
Pollando 14.4 zlotoj	S-ro Edmund Sidorowicz, Warszawa, Swierczewskiego 82-a, m. 22,
Portugalujo 106 esk.	S-ro J. Antunes, Av. Uruguai, 21, 5ª Dtª, Lisbõa-4
Usono 3.90 dol.	S-ino William H. Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, Calif, 94010.

En la landoj, kies nomoj ne troviĝas en la supra listo, oni bv. sendi abonkotizon (egalan al 12. —n. gld.) al: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando, aŭ rekte al: Oomoto, Kameoka, Kioto-hu, 621 Japanujo.

Indekso de OOMOTO 1972

Pri-Oomotaj

- Ekspozicio "La arto de Onisaburo kaj lia skolo" en Parizo..... 1
Japana ĵurnalismo pri la ekspozicio "La Arto de Onisaburo kaj lia skolo" 65
Inaŭguro de "La ekspozicio de artaj verkoj de Onisaburo kaj lia skolo".... 97
Aliĝu al Secubunfesto de Oomoto..... 103
Onisaburo kaj lia skolo..... 129

Pri Esperanto kaj Movado

- La Esperanto-Movado en Vjetnamujo 5, 51
Kiel ni, japanoj, kontribuu por la tutmonda Esperanto-movado..... 41
Kio necesas por pli efika laborado?..... 44
La Fundamento de Esperanto..... 68
La Esperanto-movado en Hindujo..... 108

Pri-lingvaj

- For la Ĥaoson..... 56
For la Ĥaosvidantojn!..... 70

Religiaj kaj filozofiaj

- Responde al s-ro J. M. Courthiade..... 10
El la Lando de la Spiritoj..... 30
Survoje al la Dia Regno..... 33

- Al triumfanta mond-koncepto 92, 123, 152
Iom pri la Biblio..... 138

Prozo kaj poezio

- Piceo, la reĝino de kolubroj..... 13
Dankpoemo..... 21
Muskaptilo 24
Anim-kalendaro 46, 72, 105
La Atlantika Oceano..... 49
Blua Drako..... 59
Danubvetura Songo..... 77
Ĉe la Ĉielpordego..... 86
Vojaĝo al Grekujo..... 114
Ŝtupoj..... 116
La Pinbosko de Anykščiai..... 117, 147
La pandetranĉajo 157

Pri-medicinaj

- La naturaj faktoroj de kuracado 82, 110, 142

Diversaĵoj

- Nekrologo 9
William Hudson King (1900-1972)..... 58
Historia fakto..... 62
Ĉanoja Salono 64
"J. A. Komensky" en pedagogia muzeo de Komensky 75